

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

N-o 40, 10. Julio 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

\* Eliras semajne. \*

## Pli ol 2000 Kongresanoj!

2020 Kongresanoj por nia XIII-a en Praha estis aliĝintaj ĝis la 4-a de Julio.  
En la Kongresejo Zofin deĵoros ŝtata Poŝtoŝeĵo kun Esp. stampilo.

### Kiu iras malrapide, iras longtempe.

(Amika respondo al la propono de Pola Esp. Societo pri la instruado de Esperanto, vidu ET n-o 36.)

La propono de Pola Esperantista Societo, plena de arda flamo por nia lingvo, havas tamen, ŝajnas al mi, unu mankon, kiun mi deziras ekzameni el praktika vidpunkto. Ĝi estas konstruita en teoria, senaera spaco kaj malmulte atentis pri la nuna stato de la esp. movado en diversaj landoj.

Jen estas kelkaj pripensindaĵoj, kiujn mi senpartie elmetas:

1. La demando pri la instruado de Esperanto povas esti proponata nur, kiam oni estas absolute, preskaŭ matematike certa pri la sukceso, ĉar ĝia forjeto povas esti granda malvenko. Estas ankaŭ eble, ke la propono estus resendata al komisiono kaj enterigata. De 1907 simila propono dormas en la kartonoj de la franca parlamento.

2. La sukceso de ĉi-tiu propono dependas: de la multombro de la esperanta nacia asocio kaj de la nombro de instruistoj kapablaj instrui nian lingvon.

Ŝajnas al mi, ke en neniuj landoj la nacia esp. unueco surpasis la ciferon de 10 000 membroj, kio ne estas tro impona kompare al aliaj societoj, enhavantaj centojn da miloj da membroj kaj klopodantaj apud la parlamentanojn.

La nombro de instruistoj kapablaj instrui Esperanton ne estas ankoraŭ sufiĉe granda. Ĉu oni ne memoras la dekreton de la hispana reĝo pri la instruado de Esperanto en 1911? Tamen kia estas la nombro de hispanaj lernejoj, en kiuj oni nun instruas Esperanton?

Sama afero en Hungarujo, kie profesoroj mankas. Ŝajnas al mi, ke la fakto de grava hungara komerciernejo, en kiu el 40 profesoroj neniuj okupiĝis pri Esperanto (vidu la respondon de la budapeŝta komerca ĉambro al la Hungara Esperanto Servo) estas frapanta, kaj bedaŭrinde, ĝi estas ne la sola.

### La hodiaŭa stato de Esperanto

de Karlo Minor.

(Fino.)

Oni devas kompari Esperantujon al vera ŝtato aŭ al granda korporacio. Kaj same kiel la landoj eltrovitaj per la ano de iu lando estas regataj per la konkerna lando, ĉiuj Esperantaj verkoj devas esti regataj per la Lingva Komitato. Sed ĉar, nature, la Lingva Komitato ne povas havi la rajton por malpermesi la eldonon de ne Esperantaj verkoj, verkitaj en nia lingvo, oni fondu — kvazaŭ kiel aldonon al la Lingva Komitato — la „Ringon“, kiun mi proponas malsupre, kaj kiu donus al ĉiu Esperantano la kapablecon por vidi: „Tiu ĉi verko estas pure Esperanta kaj tiu ne estas!“

Rilate al la punkto 2. la Lingva Komitato publikigu la prilingvajn decidojn ktp. ne kiam ajn ĝi volas kaj nur en Oficiala Gazeto (ne ĉiu povas aĉeti ĉiujn ĵurnalojn!), sed ĝi ankaŭ buŝe publikigu ilin dum la Internaciaj Kongresoj kaj presite publikigu ilin kune kun la Kongresaj Raportoj, kiuj ĉiam estas respektataj en preskaŭ ĉiuj ĵurnalojn.

3. Nenia registaro mem kaj sole aliigas siajn leĝojn, kaj nenia organizacio aliigas sian regularon nur laŭ la decidoj de sia prezidantaro, sed tiu prezidantaro ĉie nur proponas la aliigojn kaj la „Generala Kuneveno“ ilin aprobas aŭ malaprobas. Niaj Internaciaj Kongresoj estas tiaj „Generalaj Kunevenoj“. Sed nature ĝis nun la plimulto de la Kongresaj partoprenantoj ĝenerale estas la loĝantoj de la lando en kiu okazas la konkerna Internacia Kongreso. Pro tio, ĝis nun, la Kongresoj ne devis decidi pri aliigoj de la Regularo same kiel ili ne povis decidi pri lingvaj demandoj. Sed ankaŭ tio estas facile aliigebla: Multuj havas la monon por partopreni la Kongresojn sed al ili

3. Laŭ la nunaj kondiĉoj Esperanto povas esti enkondukata laŭleĝe en kelkaj ŝtatoj kun federacia sistemo, kiel Usono, Brazilujo, Svisujo, aŭ en ŝtatoj, kie la publika instruado estas aŭtonoma, kiel en Germanujo. Sed estas neeble pensi pri tio en ŝtatoj kun alcentriga sistemo, kiel Francujo, Svedujo, Polujo ktp.

4. Neniu parlamento akceptos la leĝon antaŭ ol efika longjara propagando kaj, precipe, konkinkaj eksperimentoj estos faritaj.

Koncerne la publikan opinionon, la rutino ne estas ankoraŭ venkita. Nur du faktojn mi citos: la prokraston de la diskuto de poresperanta propono ĉe la societo de nacioj kaj la diskuton pri Esperanto en la konferenco de la Ruĝa Kruco en Genève, kiam la itala delegito ne sciis, kio estas Esperanto.

Koncerne la eksperimentojn, estas alia pli modesta vojo enkonduki laŭgrade Esperanton en la lernejoj.

Ĉiu lando havas lernejojn, fonditajn de publikaj institucioj kaj subtenatajn de la registaro, ekz. komercajn lernejojn aŭ teknikajn, kaj la decido de la subtenanta ilin institucio sufiĉas (vidu la decidon de la pariza komerca ĉambro). En multaj landoj estas disvastigitaj asocioj por vespera eksterlerneja instruado. Kelkaj ŝtatoj multe favoras ilin kaj, ekzemple, en Francujo estas projekto pri deviga eksterlerneja instruado. Tiu lernejo povas esti la unuaj etapo de la oficiala nedeviga aŭ deviga (se estas eble) instruado de Esperanto. Tio povos lerni la lingvon ankaŭ la estontaj instruistoj.

En ĉiu lando estas supera institucio okupiganta pri la instruado en lernejoj: le Conseil Supérieur d'Instruction Publique (Supera Konsilantaro de Publika Instruado) en Francujo, Reichsschulkommission (Regna Lerneja Komisiono) en Germanujo, la Landa Lerneja Konsilantaro en Bohemujo, Board of School (Lerneja oficejo) en Anglujo, la Scienca Komitato de Ministroj de Publika Instruado en la antaŭrevolucia Rusujo, ktp.

Kiam sufiĉe da tiuj memstaraj lernejoj oficiale enkondukos Esperanton, tiam demando, bazita sur la rezultatoj, povos esti adresata al ĉi-tiu

institucio, demandanta la ĝeneraligon de la instruado. Sed tiuokaze oni devas esti prudenta kaj esti certa pri la favoro de la plimulto da membroj. Permesu citi al mi konvinkantan faktan: direktoro de iu finnlanda liceo demandis la pasintan jaron al lia estraro permesi la instruadon de Esperanto. Tiu-ĉi, kvankam la permeso estis en lia kompetenteco, forsendis la demandon al la konsilantaro de ministroj, kie post longa diskuto la demando estis prokrastata.

Kiam ĉi-tiuj gradoj estos transiritaj kaj la ĝenerala stato de la movado en la lando estos prospera, nur tiam oni povos pensi pri parlamenta leĝo.

Estus nun tre danĝere fari la duan paŝon antaŭ la unua, kiel diris historiisto pri la klera aŭstra monarĥo Franco-Jozefo I-a plena da bonaj intencoj. Mallertia paŝo, surprize renkonfita opozicio, neantaŭvidita barilo nur malutiligos al Esperanto, malgraŭ la bonaj intencoj de ĝiaj gvidantoj, kiuj ne devas malproksimiĝi de la reala vivo.

Paris.

Afo.

### Monumento por D-ro Zamenhof.

Antaŭ ĉ. unu jaro s-o Oberroman en Varsovio proponis al ni eldoni memorverketon pri la lastaj tagoj de d-ro Zamenhof kun ilustraĵoj pri la funebra ceremonio. Parto de la enspezoj el tiu verketo estu uzata por starigo de „Monumento-Fondo“. Ni akceptis la proponon de s-o O., sed la afero iom prokrastis, tiel ke la verketo, kiu nun estas presata, aperos nur je la kongreso de Praha. S-ino Zamenhof konsentis, ke la verketo estu dediĉata al ŝi.

Nun ni legis en „The British Esperantist“ alvokon de s-o J. D. Applebaum al „Tutmonda Monokolekto por Monumento al D-ro Zamenhof“, en la nomo de internacia komitato kaj iniciatintoj, pri kies formiĝo ni ĝis nun nenion sciis. Kompreneble ni tute aprobas la enteprenon kaj disponigos al ĝi la sumon destinitan por la monumento el la vendado de la memorverketo.

mankas la tempo. Oni ofte petis tiajn samideanojn doni certan sumon por alia, kiu havas la tempon, sed ne la monon. Estonte oni plenu la sumojn donatajn de tiuj kiuj mem ne havas la tempon por partopreni la Kongresojn kaj per tiu mono oni sendu certan nombron da delegitoj el ĉiuj landoj, se oni ne povas elekti taŭgajn delegitojn inter tiuj kiuj partoprenas la Kongreson per sia propra mono. La lando en kiu okazas la Kongreso ne povas sendi delegitojn. Kaj komparante la nombron da samideanoj en la lando de la Kongresa urbo kun la nombro da Kongrespartoprenantoj el tiu ĉi lando, la Komitato (aŭ la Kongresa aŭ la Lingva) fiksu, lau la sama proporcio, la nombron de voĉoj kiuj prezentas la delegitojn de la diversaj landoj. Se iu lando sendis 3 delegitojn, ĉiu unuopa el ili prezentas trionon el tiuj voĉoj ktp.

Se tiamaniere ĉiu lando estos proporcie egale prezentata, oni povos aliigi la Regularon de la Lingva Komitato kaj tiun de la Kongresoj, se necese, per la Kongresoj. Kaj dank' al tiaj delegitoj oni ankaŭ povus decidi dum la Kongresoj pri lingvaj demandoj kaj aliaj aferoj kiuj koncernas Esperantujon.

La Lingva Komitato — rilate al prilingvaj decidoj — nur havu la rajton kaj devon por specigi kaj prepari ĉiujn lingvajn demandojn ekaperintajn de post la lasta Kongreso. Krome la Lingva Komitato korektigu niajn vortarojn, lernolibrojn kaj klasikajn verkojn aŭ almenaŭ verku komentaron al la Fundamenta Krestomatio laŭ la hodiaŭa stato de nia lingvo.

Do: kiel tia korektigo estiĝus ebla? Aŭ per komentariaj aldonoj almetitaj al la F. K. almenaŭ, aŭ per simpla anstataŭo de la nekorektaĵoj per la korektaĵoj kaj plej trafaj esprimoj. Kvankam ĉi-tiu lasta maniero unuamomente ne

plaĉos al la admiremluloj al nia Majstro, mi eble povas konsenti ĝin per responda ekzemplo el la historio de aliaj lingvoj: La Germanaj klasikuloj en sia tempo uzis la vorton „kōmmi“ (tria persono, tempo estanta, de „kommen“). Hodiaŭ, en Germano lingvo, oni anstataŭe diras „kommt“. Sekve, en la novaj eldonoj de tiaj klasikaj verkoj, troviĝas ĉiam la formo „kommt“. — En Franca lingvo, en malnova tempo, oni diris kaj skribis „beste“ por la hodiaŭa „bête“, kaj en multaj kazoj kie nun staras „s“, „t“, en tiam tempo staris „s“. Nuntempaj eldonoj de tiaj malnovaj francaj verkoj certe korektigas tiajn vortojn laŭ la nuna stato de la Franca lingvo. Kaj tiaj korektoj ne malutilas al la klasikaj verkoj — kontraŭe! Kial do ni ne agu sammaniere?

Nia unua tasko do devas esti: pripreni ĉiujn aferojn ĝis la venonta Internacia Kongreso — eble jam sufiĉos la tempo ĝis Praha! Kaj se ĉiu samideano ĝis tiam decidis, oni pridiskutadu la aferon dum tiu Kongreso — ne nur la Lingvo-Komitato sed ĉiuj unuopaj ĉeestantoj kune kun ili kaj la delegitoj! — kaj se oni konvinkiĝis ke mi estas prava, se oni reverŝis la malnovan Lingvan Komitaton kaj restarigis novan kun nova pli trafa Regularo kaj novan formon de § 15 de la fundamento, oni preparoladu ĉiun vorton kaj esprimon, pri kiu tiu ajn prave dubas. Niaj gazetoj eble intertempe estigas Polemikejon en siaj kolonoj, en kiu ĉiu leganto povas sciigi prudentan opinionon pri dubindaj demandoj. Kaj post tiu Kongreso ĉiu nova eldono de niaj lernolibroj, vortaroj kaj klasikaj verkoj, farita de ano de la „Kongresa Ringo“, devas esti korektigata laŭ la decidoj de la lasta Kongreso.

Tiu „Kongresa Ringo“ ankaŭ devas esti fondata dum la sama Kongreso. Al ĝi ĉiu eldonanto de literaturaj verkoj, gazetoj, vortaroj kaj lerno-

En Praha ni do vendigos la mencitan libreton po 30 ĉ. kronoj (2 ŝilingoj), el kiuj la duono estas desinita por la Monumento-Fondo.

La memorverketo enhavas sur 48 paĝoj de arta papero artikolon de s-o Wüster pri la lastaj tagoj de la Majstro kaj la funebra ceremonio, poemojn de s-oj Belmont, Hiller ktp. kaj 12 ilustraĵojn laŭ originalaj fotografadoj pri la funebra proceso, la enterigo, parolado de predikanto d-ro Poznanski, de s-ano Grabowski kaj de majoro Neubarth, la tombo, esp. monumento en Franzensbad kaj portreto de la Majstro.

Ni esperas, ke la verketo trovos la aprobon de la tutmondaj samideanoj kaj instigos ilin je riĉa donacado al la fondo starigita por konstrui indan monumenton sur la tombo de la Majstro, dum iu estonta universala kongreso aŭ pilgrimado al Varsovio.

*Eldonejo de ET.*

## Praha.

La ĝen. sek. de la Loka Kongresa Komitato sendis al ni jenajn informojn:

Ĝis la 4-a de julio aliĝis 2020 kongresanoj. En la kongresejo sur insulo Zofin deĵoras ŝtata letera kaj telegrafa poŝtofunkcio kun esperanta stampilo.

Ĉiu kongresano, alveninte Prahon, devas iri al la akceptejo sur Zofin, kie nur li ricevos loĝigkarton kaj ĉiujn dokumentojn. En la stacidomo de Praha atendos esp. fervojistoj la alvenontajn kongresanojn.

En la akceptejo deĵoras kongresa monŝanĝejo kiu ŝanĝos monon laŭ pli alta kurzo kaj pli favore ol la bankoj en eksterlando. Pro tio oni ŝanĝu nur en Praha.

Por tiuj, kiuj ne ekkursos la 4-an de aŭg. al Moravia Kras, kiuj jam estas konata precipe de la ĉeĥoslovakaj samideanoj, la saman tagon estas aranĝata ekskurso al la mezepoka kastelo „Karlův Týn“ (unu horon per persona vagonaro de Praha), al la loko, kiun pritraktas la kongresa teatra prezentado.

Jus estas sendataj al la kongresanoj la fervoj-legitimacioj, kiujn oni stampigos ĉe la persona kaso de la limstacio.

Ĉar la ĉeĥoslovaka ministerio por eksterlandaj aferoj ne invitos mem la fremdlandajn registarojn, la loka kongresa komitato invitis la fremdajn ambasadorojn kaj konsulojn en Praha, por ke ili reprezentu siajn registarojn.

## Antaŭ kaj post Praha.

Al ĉiuj vizitontoj de Berlin

ni sciigas, ke la projektita salutvespero okazos jam la 26-an de julio, vespere, por ke la estimataj gastoj povu veturi Dresdenon la 27-an pm. por esti tie ĝustatempe je la komenco de la antaŭkongreso la 28-an matene je la 9-a.

Samideane salutante

*Esp. Gruparo Berlin.*

Kongresanoj venu al Wien!

Antaŭ kaj post la kongreso estos ĉio aranĝata per via akcepto. Anoncu vin ĉe Hugo Steinhauer, Wien II, Böcklinstr. 8.

Antaŭkongresa kunveno en Brno (Brünn), Moravio.

Ĉiuj kongresanoj venontaj el Sudeŭropo (Sofia, Saloniki, Aĥeno, Belgrad, Zagreb tra Budapeŝto, Wien) veturos tra Brno, ĉefurbo de Moravio, kie ili vizitos Napoleonan batalejon ĉe Austerlitz (Slavkov, 9 km), poste la mondkonatajn grofojn

libroj povas aniĝi. La eldonadoj de ĝiaj anoj devas porti sub la titolo noton, eble tekstantan: „Anigita al la Kongresa Ringo“. La gazetoj de tiu „Ringo“ en sian redaktistaran parton nur enpresu la vortojn, esprimojn, afiksajn ktp. aprobitajn ĝis la lasta pasinta Kongreso. En la neredaktistaran parton (enhavantan literaturajn, recenzajn, prilingvajn diskutadojn ktp.) ili enpresu laŭ sia volo novaĵojn kaj malnovaĵojn esprimojn ne aprobitajn. La libroj, kiuj portas la supran noton, ankaŭ respektu la lasikongresajn decidojn, kaj se anigita eldonanto volas publikigi libron kun diferenciganta enhavo, li nur ellasu la koncernan noton. Kaj la samo rilatas al vortaroj kaj iliaj eldonantoj.

La nova Lingva Komitato dum la intertempo de unu Kongreso al alia ne faru decidojn, sed nur prilaboru, specigu kaj preparu la prilingvajn polemikojn al ĝi alsenditajn kaj publikigitajn en la gazetoj, kontrolu la eldonitaĵojn de la anoj de la „Ringo“ kaj korektigu aŭ komentariu la klasikajn verkojn.

Ĉiu nova eldono de niaj klasikaj verkoj, vortaroj kaj lernolibroj, farita de ano de la Kongresa Ringo, atentu la malgrandajn ŝanĝitaĵojn intertempo aprobitajn. Kaj se tiuj decidoj estos multnombraj la unuan fojon, oni pripensu ke la unuaj interkonsililoj riprezentos la rezultitaĵojn de 34 aŭ 35 jaroj.

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

Esperantistoj vojaĝantaj tra la mondo dum ses—sep jaroj.

S-anoj Stoeltje kaj Seubring el Haarlem (Nederlando) antaŭ nelonge ekvojaĝis per bicikloj el sia patrolando por viziti la kongreson en Praha kaj poste vojaĝi dum 6—7 jaroj tra la tuta mondo. Ambaŭ estas junuloj de 26 resp.

stalakto-stalagmitajn en Moravia Karsto kaj abismon Macoha (138 m profundan), norde de Brno. Kunvenontaj kongresanoj poste are veturos en Prahon al la kongreso.

Esp. klubo en Brno preparis esp. gvidlibron tra Moravia Karsto, tiu mirindaĵo de nova tempo. Ĉar la komuna kongresa ekskurso al Karsto estas aranĝata la 4-an de aŭgusto, vi profitos tiun tagon traveturi kaj vizitinte Karston antaŭ la kongreso. Venite kaj vizitu nin, samideanoj, vi estos agrable surprizitaj per ĝis nun neviditaj mirindaĵoj de subtera mondo.

✉ Skribu pri raportoj: Esperanto, Brno, Falkensteinstr. 14, Moravio, Ĉeĥoslovakio.

Reprezentanto de la Frankfurta Foiro.

Kiel reprezentanto de la esp. fako de l' Frankfurta foiro, s-o R. Kreuz vizitos la kongreson de Praha.

## Internacio Katolika.

Kunigo de Buked kaj Ika?

Dum la unua kongreso de Buked (Bund kath. Esperantisten Deutschlands) en Essen oni pritraktis ĉi tiun demandon kaj decidis post vigla diskutado jenon:

La granda celo realigota estas la verbado por Ika (Internacio Katolika), t. e. por la pli vasta celo ĉion ampleksanta. En paroladoj, kunvenoj ktp. oni do principe parolu nur pri Ika, montrante ĝiajn belegajn celojn. En la fondotajn Ika-grupojn oni akceptu ankaŭ grandmase neesperantistojn, kondiĉe ke ili estas pretaj pagi ne nur la ligokizon de 3 mk. (sendotan al Graz) krom la loka kofizo sed devige aboni ankaŭ la ligorganon „Espero Katolika“. Sufiĉus monataj kunvenoj germanlingvaj, en kiuj oni pritraktu krom la Ika-celoj daŭre kaj intense la „teknikan rimedon, nepre necesan por realigi la Ika-celojn“, t. e. nian helpilngvon. Sed la esperantistoj (malnovaj, t. e. Buked-anoj, kaj la nove varbitaj) kunvenu semajne en specialaj kunsidoj, formante la Buked-grupojn.

Buked estonte do estu la centro de la esp. membroj de germanaj Ika-anoj, donante al ili adresaron, alproksimiĝon, interrilatojn inter si kaj kun GEA, okazon por pliperfekto de la lingvaj konoj ktp. Ĉiam kaj ĉie la Buked-anoj pro la scipovo de Esperanto estos la plej perfektaj Ika-anoj kaj ĉiel klopodas disvastigi Esperanton inter la Ika-anaro ankoraŭ ne esperantista. La Buked-anaro do estos interne de Ika la brila ataka trupo posedanta la rimedon por povi labori praktike sur ĉiuj agadkampoj de Ika. Vidante tion kaj sen Esperanto ne povante legi la ligorganon, la plej granda parto de la membroj de la Ika-lokogrupoj iom post iom fariĝos esperantistoj. La ligokizo (krom la laŭvole alta loka kofizo) estos pombembre kaj poĵare; 3 mk. por la Ika-centrojo en Graz („individua membro de Ika“), 12 mk. por la ligorgano, 2 mk. por Buked, 1 (unu) mk. por GEA (korporacie alligita). Estos la tasko de la venonta jarkunveno de Buked aprobi definitive la la Essen'ajn decidojn. M. Mielert, Breslau.

(Ĉe aliĝo aŭ korespondado oni bonvole ĉiam almetu la resendkoston.)

## Junularo.

Franca grupiĝo de junuloj „L' Effort“ (La Peno) antaŭ nelonge fondita kaj celanta la studadon de socialaj problemoj en diversaj landoj en la demokrata senco, deziras havi eksterlandajn peresperantajn korespondantojn pri socialaj demandoj.

27 jaroj; Seubring estas pli ol du metrojn granda, Stoeltje havas preskaŭ du metrojn. Krom holande kaj esperante, unu el ili parolas germane, la alia angle. La unuan esp. grupon, kiun ili vizitis en eksterlando, estis la grupo en Münster (Vestfalo), kie ili restis dum du tagoj ĉe la deleĝito de UEA. La esp. Münster'anoj estis tre ĝojigitaj per la „alta“ vizito kaj aranĝis feston por ilia honoro. Kelkaj samideanoj eĉ akompanis ilin bicikle unu horon en la direkton de Bielefeld. La kuraĝaj nederlandanoj oficiale raportas al diversaj holandaj gazetoj pri siaj vojaĝimpresoj. Por esti ĉie tiuj ekkonataj kiel esperantistoj, ili portas brakobanderojn kun granda verda stelo. Certe ilia vojaĝo estos tre interesa kaj de granda propaganda valoro por la esp. movado.

V-a Kongreso de Nederlanda Laborista Esp. Federacio

okazas la 10-an de julio. La 17-an de julio estos festotago de la federacio „La Estonto estas Nia“ en Haarlem, Nederlando.

Nova grupo en Weiden (Germ.).

En kolonio Weiden apud Köln fondiĝis grupo „Verda Stelo“; prez. s-o Obermanns, sek. Fusswinkel. Adreso: Bahnstr. 3 D, Weiden Bez. Köln.

Esp. Ekspozicio dum Atletika Festo en Japanio

6000 personoj vizitis la esp. ekspozicion, kiun la samideanoj de Kioto aranĝis okaze de granda atletika festo en Soken-Kan Salonego.

Hebrea Esp. Grupo en Jonava, Litovio.

En Jonava, Litovio, s-o Jakob Dembo, Turgo g. 15, fondis societion kaj gvidas kurson kun provizore 15 gejunuloj. La nombro de la kursanoj certe plimultiĝos, se sufiĉe da lernolibroj estos pretaj. Ĉar ne ekzistas lernolibroj en

La komitato de ĉi tiu asocio estas favora al la lingvo internacia, kaj la devo de la esperantistoj estas pravi al ĝi, ke Esperanto utilas.

Bonvolu skribi al s-o P. Petit, 59, rue de Neuilly, Rosny-sous-Bois (Seine), Franclando. La aliaj gazetoj bonvolu represi.

## Socio.

Striko de la ĉeĥoslovaka bankoficistaro.

En la fremdlanda ĵurnalaro svarmas diversaj informoj pri la striko, informoj ĝustaj kaj neĝustaj. Per sekvantaj linioj mi celas laŭvere informi la eksterlandajn interesatojn kaj mi petas ĉiujn samideanojn, ke ili traduku kaj publikigu mian raporton en sialanda ĵurnalaro kaj ke ili sendu al mi po unu ekzemplero de ĉiu ĵurnalo, en kiu mia raporto aperos.

La plej gravaj bank-institutoj en Ĉeĥoslovakio estas aŭ bohemiaj (ĉeĥaj) aŭ germanaj, kaj ambaŭ kategorioj estas organizitaj en „utrakvista Svaz ĉeĥoslovanských bank“ (Asocio de ĉeĥoslovakaj bankoj). Tiu ĉi asocio estis siatempe fondita kiel banka kartelo por akceli la negocan flankon de la financa entreprenado, sed per si mem ĝi evoluigis kiel defenda organizacio kontraŭ ĉiuj bankaj dungitoj (oficistoj kaj servistoj).

Ĉeĥoslovakaj bankoficistoj estas organizitaj laŭnacie en du asocioj: la bohemiaj en „Sdružení peneznihe urednictva“ (Asocio de la financa oficistaro) kaj la germanaj en „Verband der Bank- und Sparkassenbeamten“ (Asocio de bankaj kaj sparkasaj oficistoj).

Ĉeĥoslovakaj bankkomizoj (iamaj bankservistoj) estas organizitaj en unu sola „Svaz zřizuce ustavu peneznich a kancelari volkozavodu“ (Asocio de komizoj ĉe financaj institutoj kaj ĉe grandkomercal oficejoj).

Kaj la oficistaro kaj la komizoj-servistoj vivis ĝis antaŭ nelonge sub tre malfacilaj, eĉ mizeraj vivkondiĉoj, kies ĉefa kaŭzo estis la ĝenerala malbona situacio kurza de l' senvalorigita mono; la salajroj estis nemulte plialtigataj, nur proksimume je 400%, kvankam la prezoj de ĉiuj plej necesaj bezonaĵoj por la plej modesta vivo plikarigis je 1000% rilate al la antaŭmilita tempo. Tial komencis akra batalo celanta havigi al la mizeruloj la plei necesan plialtigon salajron, kiu ebligis al ili vivon, kiun ili laŭ sia socia evoluo plene meritais. La batalo finis en februaro 1921; la oficistaro venkis kaj nature alpaŝis tuj al la dua punkto de sia penado, nome al efektivaĵo de sia postulo pri tiel nomata deĵora pragmatiko.

Devas ĝin postuli nur la personaro de la bohemiaj bank-institutoj, la kolegoj en la germanaj bankoj ĝuas ĝin jam de 1 1/2 jaro.

La deĵora pragmatiko estas regularo, kiu estas difnonta kaj garantianta la jurajn rilatojn de l' bankaj personaroj al iliaj laboradantoj, la bankoj. La ĉefa punkto de la disputo estas t. n. personaraj komisionoj, balotataj de la personaro mem. Tia komisiono rajtus decidi interkonsente kun la direkto pri ĉiuj aferoj koncentrantaj la dungitaron, tiel la tuton kiel la unuopulojn, pri dungado, maldungado, promociado kaj justa rekompencado de la personaro (ekskluzive tiu de direktoroj kaj vicedirektoroj), tamen la lasta decidinstanco restus la administra konsilantaro, en senco de la leĝo pri akciaj societoj.

La deĵora pragmatiko celas malebligi la ĝisnunan sistemon de protektado, kiu en multaj bankoj profunde alradikiĝis. Tial la efektivaĵo de tia postulo fariĝus ne nur socia sed ankaŭ morala sukceso.

hebrea lingvo (la gepatra lingvo de la kursanoj) oni presos hebrealingvajn lernolibrojn per ŝapirografo.

Unuigo de esp. vegetaranoj en Bulgarujo estas fondita. Ĝi celas unuigi ĉiujn esp. vegetaranojn en Bulgarujo, disvastigi Esperanton kaj propagandi la vegetarismon. Prez. s-ano Kiro Georgiev, sek. -kas. s-ano Dimitre Simeonov, strato 6, septembro, n-o 1, Sofia. La unuigo havos sian unuan kunvenon dum la kongreso de Bulgara Vegetarana Asocio la 14. aŭg.

Kursoj en Tokio.

Ĉe Sendagaia Societo por Junuloj kursoj funkcias kun 80 partoprenantoj; ĉe Nippon Esperanto Sya kurso por komencantoj kun 30 personoj kaj progresiga kurso kun 20 personoj; plia kurso ĉe Tokia Dentista Kolegio. Novaj grupoj formiĝis ĉe Aojama Akademio kaj Tokia Komerca Universitato.

## Poŝto.

La sovjeta komisario por poŝto kaj telegrafo konfirmis la sciigon, laŭ kiu baldau okazos internacia poŝta konferenco de la orient-eŭropaj landoj. Partoprenos en la konferenco: Germanujo, Ruslando, Polujo, Finnlando, Estonio, Litovio, Latvio, Danujo, Svedujo kaj Norvegujo. La konferenco okazos laŭ iniciato de la sovjetoj.

Laŭ sciigo de s-ano Stuart-Menteth en London ekzistas ankaŭ Latina Poŝta Unuigo, per kiu la landoj, kie oni parolas la latinidajn lingvojn, havas malkaran tarifon inter si. La brita ministro diris, ke la pli alta brita poŝtarifo ne longe daŭros. La plej alta poŝtarifo estas eble en Estonio kaj Polujo, kie letero kostas 10 mk.; tamen la alteco de tiu tarifo estas nur ŝajna, ĉar por pola marko oni nun pagas maksimume 4—5 germ. pfenigojn.



La personaro de la bohemiaj bankoj komencis sian strikon la 24-an de junio en Praha, ĉefurbo de la respubliko, kaj nur la tujan tagon la striko disvastiĝis tra la tuta respubliko. Ĉar la striko ne tuj atingis la deziritan sukceson, eĉ la kolegoj en la germanaj bankoj komencis sian strikon la 28-an de junio, tiam pli, ĉar la direkto de la germanaj bankoj, vidante la obstinan malcedemon de la bohemiaj direktoj, komencis ninanci per la intenco repreni, nuligi la ekzistantajn deĵoran pragmatikon de siaj personaroj.

La striko daŭras tute frankvile, nur antaŭ kelkaj bankoj okazis malgrandaj demonstracioj kontraŭ la strikrompantoj. Sumo strikas 9000 bohemiaj kaj 8000 germanaj dungitoj. La strikrompantoj estas nur 10% enkalkulante jam la vicdirektorojn, prokuristojn kaj estrojn de la filioj; inter la ofistaro strikrompanto estas malofitoj, inter la servistaro estas tute neniu.

La humoro en ambaŭ tendaroj estas tre bona, firma kaj malcedema, la intertraktado ankoraŭ ne komencis. Estas atendataj interpelacioj parlamentaj kaj peza impulso flanke de la registaro.

Pri la plua procedo mi sammaniere informos kaj nature ankau pri la fina rezultato.

Mi estas ĉiam preta respondi ĉiujn demandojn pri eventualaj detalajoj kaj mi petas speciale la kolegojn-bankoficistojn en la tuta mondo, ke ili ekinteresigu pri la problemoj, kiu certe estas tre interesa kaj frege grava, ĉar ĝi celas doni al la dungitaro tiujn kondiĉojn, ke la dungito vendadu kontraŭ la salajro nur sian laboron kaj neniam kaj neniel sian propran personecon, kiu estas kaj devas resti sanktaĵo de ĉiu unuopulo!

O. Sklenčka,  
del. UEA, Hradec Kralové, Ĉeĥosl.

## Tra la Mondo.

La striko de la anglaj ministoj estas ĝenerale finita. En Derbyshire multaj minejoj estas tute fermataj, ĉar la ŝaktoj estas subakvigitaj kaj provizore ne povas esti uzataj. Per la striko perdiĝis ĉirkaŭ 70 milionoj da labortagoj.

En Smyrna (Malgranda Azio) eksplodis municie depoto kaj mortigis multajn personejn. Laŭdire ĝi tenis la municiajn rezervojn de la greka armeo.

El Moskvo oni sciigas, ke la urbo Baku brulogas. Parto de la urbo kaj kelkaj oleofontoj estas detruitaj.

## Sporto.

Piedpilkolo.

La ludo de Kölner Ballspiel-Klub kaj Sportbrüder Praha en Köln finiĝis 0:0.

## Gazetaro.

En japanaj ĵurnaloj.

En „Jomiuri Sinbun“ (Tokio) aperis artikolo pri Esperanto kaj d-ro Zamenhof de s-o Oossaka; en „Asahi Sinbun“ aperis rakonto pri d-ro Zamenhof de d-ro Ramstedt kun ilustraĵoj, kaj alia artikolo (en tri daŭrigoj) pri Esperanto kaj d-ro Zamenhof de vicgrafo C. Misiama.

Pri festeno pro memoro de d-ro Zamenhof raportis 4 tagĵurnaloj (Asahi, Tokio-Mainici, Manĉo kaj Chujo) kaj „Japan Advertiser“.

NEUE LODZER ZEITUNG (ĉiutaga en Lodz, Polio), 12. junio. Enhavas artikolon de s-o Berman pri Esperanto en Vieno.

DOS NAJE LEBEN, hebrea ĉiutaga en Bialystok, enhavas en sia n-o de 6. junio artikolon pri la Praha kongreso.

La grava franca gazeto LES DEBATS de 21. junio anoncas, ke la franca sekcio de la internacia komerca ĉambro decidis prezenti al ĝia kongreso malfermita la 27. junio en London la raporton de la pariza komerca ĉambro pri Esperanto.

## La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

(27-a daŭrigo.)

„He, kiam do estos fino de ĉi tiu historio?“ diris John levigante.

„Ha, mi petas pardonon, Mr. John,“ ironie ridetis la sinjorino. „Nu, mia kara, efektive ni jam devas fini. Mi vin dungos, se ni interkonsentos pri la salajro. Sed mi vin antaŭsciigas, por ke vi sciu: mi amas, ke oni faru ĉion laŭ nia maniero, ne laŭ la ĉi tiea.“

„Tio estas la plej bona,“ aprobis Mateo. „Mi respondos por vi antaŭ la homoj kaj antaŭ Dio. Dimanche ni kune estos vizitantaj la preĝejon, sed mi ne permesos, ke vi vizitadu tiujn balojn kaj meeting'ojn.“

„Obeu la sinjorinon, Anna,“ diris Mateo. „La sinjorino ne instruos al vi malbonaĵojn...“ Ŝi ne ofendos la orfloron...“

„Dek kvin dolaroj monate estas ĉe ni konsiderata kiel tute ne granda salajro,“ diris John, rigardante la horloĝon. „Dek kvin dolaroj, aparta ĉambro kaj unu libera tago ĉiusemajne.“

La sinjorino, same frankvile trikante, jetis sur John-on pereigan rigardon kaj turnis sin al Anna.

„Ĉu vi scias, kiom valoras dolaro?“

„Du rublojn, via Moŝto,“ respondis Mateo antaŭa Anna.

„Ĉu vi jam ie servis?“

„Jes, mi servis kiel ĉambristino ĉe sinjorino Zaljeska...“

„Kian salajron vi ricevis?“

„Elparolu: „miting“ = kunveno.“

L'AVENIR (La Estonteco), Paris, 30. junio, enhavas tre favoran artikolon „Esperanto“ de sia direktoro s-o Chaumet, deputito, eksministro, en kiu li citas la deziresprimon de 21 akademianoj kaj la proponon al la internacia komerca ĉambro.

DE TECHNISCHE HOCHSCHULE. 1. julio.

Organo de la Teknika Altiterno en Charlottenburg, enhavas bonegan artikolon de Eugen Wüster pri „La signifo de la mondhelpingvo Esperanto por la teknikisto, ĝia esenco kaj ĝia disvastiĝo de la mondmitilo“.

POSENER NEUESTE NACHRICHTEN. Posen (Poznan, Polio), 26. junio. Enhavas en Esp. Angulo recenzon pri ET.

GAZETA GDANSKA. Danzig, 15. junio.

Kun artikolo pri la kongreso en Praha kaj pri eventuala kongreso en Danzig 1922.

FRFYTUM, meĵo-junio 1921.

Organo de Frey-Ligo. Kun artikolo de Nienkamp, Schlüter, Dohm, Boldt kaj Dr. Friedenthal.

FRANKFURTER MESSZEITUNG. 25. junio.

## Recenzejo. LIBRO.

PERLOJ EL LA ORIENTO. Tradukoj el japanaj kaj ĉinaj klasikaj verkoj de K. Oossaka. Japana biblioteko Esperanta, Serio II, n-o 1. — 40 pg. 5 1/2 x 8 cm. 1921. Eldonejo Esperanta Nippon Esperanto-Sya, Tokio, Kanda-ku, Omotesarukujyo 2. Prezo: kartonis 0,50 Yen, alfrankie. Brillantaĵoj perloj, prezentaj el la riĉega trezoro de la ĉin-japana literaturo, kuŝas disse semitaĵ sur la paĝoj de la bone presita libro. Mi ofte aŭdis kaj legis la aserton de eŭropaj emimentuloj kaj kompetentuloj, ke ne ekzistas io pli ĉarplena, pli rava, pli beleaga ol ĉina poemo. Sed, kiom da eŭropanoj sciopovas la ĉinan lingvon? Pro profunda lingva diferenco orientaj literaturoj ne estas bone tradukeblaj en eŭropajn lingvojn ne perdante sian ĉarmon. La tradukinto mem jesas tion konfesante, ke la aĵero estas tute alia kun la internacia lingvo. Danke al ĝia libera strukturo, li trovis mirigan fastecon tradukante la literaturojn. Ĉu ĉi tiu fakto ne estas ree konvinkanta pruvo pri la supereco de Esperanto super aliaj idiomoj? Li preskaŭ laŭforte tradukis respegulante la belecon de la originaloj. Oni povas diskutu pri la bon-simlo de la versaĵoj. Sed tio ne gravas.

La libreto enhavas legendon de la insulo Formosa, ĉinajn poemojn kaj prozaĵojn, eldirojn de la grandaj ĉinaj filozofoj K'ung Tzu (Konfucio) kaj Meng Cu kaj eltranŝojn el la luĉa (ĉi poemo Omoro-Soŭsi el la antikva luĉa lingvo.

La tabelo de la enhavo estas presita japane kaj Esperanto, ankaŭ la antaŭparolo. En la libro mem la tradukinto prezentis la poemojn japane kaj ĉinlingve (sed ŝi per laŭajn literoj) kaj Esperante, la prozaĵojn nur en Esperanto.

Drakoj, prabestoj, dioj kaj diinoj, bonaj kaj malbonaj spiritoj, herooj, damoj kaj potencaj imperiestroj ludas la rolojn en la diversaĵoj leĝaĵoj. Misera muziko sonadas, por eŭropa orelo strangaĵoj vortoj kaj nomoj svarmas tra la rakontetoj kaj versoj, kiujn kanis kulturitaj popoloj jam longe antaŭ la naskiĝo de Jesuo Kristo. Ni marveturas dum varmataj someraj noktoj, flaras dolĉan odoron de fabelaj floroj kaj plendas, ke tiu tempo estas forpasinta, for — por ĉiam.

Kiu saĝecon havis la fiamaj filozofoj, kia vivkompenzo feliĉigis la homojn, kiuj adoris siajn poetojn kaj admirante ornamis sin per neniam mortantaj perloj; ĉar la perloj vivas sur sangvarma haŭto kaj versoj vivadas en la kantoj de l' ĉino.

La volumeto enhavas kelkajn preŝerarojn. La ritmo de la versaĵoj estas kelkloke iom stranga pro tio, ke la orienta poeto ne ĉiam atentis ĝin. Ĝenerale ĉiu verso havas difinitan nombron da silaboj, sed la poeto ne estas katenita per silabnumero. Tial la poeziaĵoj similas al hebreaĵoj: ambaŭ poemspecoj bazigas sur la paralelismo.

Mi rekomendas la verketon al ĉiu literaturamanto, kiu volas konatiĝi kun orientaj perloj de la poezio kaj de la literaturo. (G. Ajul.)

SIPOPEREO, kaj: LA ILUZIO KAJ LA TEMPO. Du poemoj en unu volumeto esperante, verkita de Rafael de San Millán. 16 pg. 4 1/2 x 6 1/2 cm. Presejo San Lucas, 5 Madrid. Prezo: broŝur. 25 cts.

Ĉu ĉarmaj poemoj, similaj al tiuj, kiujn kanis la tradukinto (kanisito) en la mezepoko prikantantaj la amon en provinca lingvo. Nur sudlandano rakontas tiel pasie en versoj emociantajn okazintaĵojn. La enhavo estas dolorplena, kortuŝanta. Mi ne volas paroli pri la enhavo de la romano. Estas bedaŭrinde, ke la moderna vivo perdis preskaŭ ĉiun romantikecon. Sed en la „Sipopereo“ reviviĝis Mistral, la granda poeto de Mirëio (slpar. Mirejo).

Ĉiu legos la versojn kun granda ĝuo, t.e. nur tiu, kiu ne infektigis per la senvaloraj modernaj poeziaĵoj.

„Ses rublojn.“

„Tro multe, ŝajnas mi, por nia lando,“ ekspiris la sinjorino. „En mia tempo tio estus tro alta salajro... Sed ĉi tie, se vi volas ricevi tridek rublojn monate, iru al li!“ Ŝi kapmontris John-on. „Li donos al vi 50 rublojn, apartan ĉambon kaj tiam da libera tempo, kiom vi dezirus, kompreneble, tage...“

Anna denove rugigis, kaj la sinjorino, rigardinte ŝin de super siaj okulvitroj, aldiris, sin turnante al Mateo:

„Tute proksime de ni, ĉe la sama strato, kristana knabino loĝas ĉe hebrea. Kaj Dio jam benis ilin per infano.“

„Vi scias ja, ke ili estas geedzigitaj,“ indigne kriis John.

„Geedzigitaj, ĉu vere? Kiu do ilin geedzigis, volu klarigi!“

„Ili estas geedzigitaj en la urbestrejo.“

„Jen, vidu!“ la sinjorino sin turnis al Mateo.

„Jen kion ili nomas geedzigo!“

Mateo kun malama ekrigardis la hebreaon kaj diris:

„La knabino restos ĉe vi.“ Kaj li aldiris per moligita tono:

„Ŝi estas plena orfino, via sinjorino Moŝto. — Por vi estos peko ŝin ofendi!“

La sinjorino, movante la trikilojn, kapjesis.

Dume John, al kiu ĉio ĉi tio tute ne plaĉis, same kiel la konduto de Mateo rilate lin, — surmetis sian ĉapelon kaj iris al la pordo, nenion dirante.

Mateo komprenis, ke la malagrabra junulo estas preta forlasi lin sola, kaj li ankaŭ ekrapidis. Li adiaŭis Anna'n, kiŝis la manon al la sinjorino kaj sin jetis al la pordo, sed tie iom haltis.

„Pardonu, via Moŝto... mi volas demandi vin...“

„Kion?“

En „La Iluzio kaj la Tempo“ sin prezentas fablosimila rakonto, kies legado meditante nin. Ambaŭ interbatalas. Morias la iluzio terenbata de la kruela tempo. La verkumiloj tion per faktaj, kion li skizante montras al ni per spuglo, en kiu ni ekvidas la vivon kaj — nin mem. Mi trovis kelkajn preŝerarojn, inter ili: „boĉo“ antaŭta „voĉo“. (G. Ajul.)

SPIELENDO ESPERANTO. De Karl J. Loy. Eldonejo E. F. Adolph en Hassloch, Pfalz (Palatinato), Germ. Prezo 2 50 mk.

Bonega verketoj por arango de facile kompreneblaj Esp. Anguloj en gazetoj kaj tagaj helpilo ĉe la instruoj; sed ĝi ne estas destinita por servi kiel lenombro.

BONAN APETITON. Mangokarto por internacia uzado en ĵingvoj esperanta, angla, franca, germana, pola kaj rusa. Elverkis I. G. Tejčhfeld, Varsovio, Marszalkowska 86. Prezo 25 cts. en poŝt. aŭ respondukp.

## GAZETOJ.

ESPERANTSKY ZPRAVODAJ. Junio.

BULGARA ESPERANTISTO. Junio.

L'ESPERANTO. Aprilo-majo.

Speciale interesa artikolo pri grafologio. Literaturaĵoj. Artikolo pri norditaliaj monumentoj kun 15 ilustraĵoj.

LA REVUE ORIENTA. Aprilo-majo.

La aprila n-o enhavas interesan klarigon de laŭkodaĵo telegramoj.

INFORMOJ de Danziga Esp. Asocio. Junio.

Kun letero de la Senato de la Liberurbo Danzig, ke ĝi tre salutas la okazigon de esp. kongreso en Danzig kaj ke ĝi estas preta ĉiumaniere subteni ĝin.

## Parolejo.

98.

(Rilatas al 90.)

Al mia letero pri internacieco de vorto „duano“ en n-o 56 de ET mi volus aldoni: „douane“ ankaŭ eniris la germanan lingvon. (Ch.-G. St.-M.)

99.

(Rilatas al 90.)

S-o St.-M. estas prava asertante, ke ni bezonas apartan radikon por signiflimpostoj, sed oni ne povas aprobi la proponatan formon „duan“. Neniu rajtas, por propraj preferoj aŭ teorialaj etimologiaj konsideroj, malateni iam ekzistantan kaj ofte uzitan formon aŭ radikon. „Dogan“ estas teorie tute akceptebla, ĝi estas jam efektive uzita kaj presita, estis akceptata ne nur de kelkaj aŭtoritataj vortaroj, sed ankaŭ de Zamenhof mem; ĝi do estas sendesidue preferinda. Dirante, ke la formo „dogan“ estas nur itala, s-o St.-M. forgesas, ke ĉiu lingvo, kiuj prezentas la formon „duan“, tamen pruntis la radikon ne rekte el la araba, sed pere el la itala lingvo.

Ĉu vi ne opinias observinda jenan praktikan regulon de elekto: Se du aŭ tri samsignifaj radikoj estas proksimume egale akcepteblaj, oni devas preferi tiun, kiu jam ekzistas en la lingvo kaj estas pli ofte uzita kaj presita, precipe se ĝi estas akceptita de Zamenhof. (E. Grosjean-Maupin.)

## Germanaj Abonantoj

havis kelkloke iom da peno por aboni ET ĉe la poŝto, ĉar la poŝto erare informis nin, ke ET estas enregistrita en la 6-a komplemento de la poŝta gazetlisto. Per nova informigo ni sciigis, ke ET estas enregistrita ne en la 6-a, sed en la 5-a kaj 9-a komplementoj. Ni petas niajn germanajn abonantojn noti tion.

## Nuboj.

1.

nuboj plenis la senfinan ĉielon per sia vaneco

2.

nepre la suno ne krevigas nubojn!  
ili donas al ĝi la lokon  
laŭ sia sensentebleco

3.

nuboj nek kuras, nek interbatalas:  
ili antaŭeniras kiel ŝafaro.

Toschi.

(El mia „Mattutino“, itala versaro laŭ modernega stilo.)

„Ĉu ne troviĝos ĉe vi ofico por mi? Por tute malgranda salajro. Eble en la korto, en legom-gardeno aŭ apud ĉevaloj? Dormolokon mi trovos ie en stalo, kaj tute malgrandan salajron al mi pagu... por ke mi nur povu vivi...“

„Ne, mia kara! Kiuĵ legom-gardenoj? Kiuĵ ĉevaloj? Ĉi tie sinjoroj senatoroj veturas trame, pagante kvin „cendoln“, kiel ili ĉifonvesita vagisto.“

„Volu pardoni! kie do li...?“

Ne fininte la frazon, Mateo ekrapidis eksteren, por ne perdi John-on el la vido.

XVI.

Alveninte sur la peronon, li vidis, ke la malagraba juna viro jam forestas, sed iu simila ŝajnis al li ĵus turni post stratungolon. Mateo kuris tien, kvankam li memoris, kvazaŭ ili estos alvenintaj de alia flanko. Li kuratingis ĵin piediranton, sed en tiu lando homoj same kiel domoj similas unu alian. La nekonato havis saman ĉapelon sur la kapo, saman bastoneton en la mano, saman irmanieron, kiel John, nur la vizaĝo de la viro estis fremda, tute ne konata kaj mirigita. Mateo konsternigis kaj poste ekvis per la okuloj la forirantan nekonaton, kaj de ambaŭ flankoj de la strato rigardadis Mateon la kurtenitaj fenestroj de l' domoj, similaj unuj al aliaj kiel du akvogutoj.

Mateo provis reveni. Li ankoraŭ ne plene konsciis la okazintan, tamen lia koro forte batis en la brusto, poste preskaŭ haltis. La strato, sur kiu li staris, estis ŝajne la sama, ĉe kiu troviĝis la loĝejo de la maljuna sinjorino, sed la kurtenoj de l' fenestroj estis mallevitaj ĉe la dekstra flanko, kaj la domoj de la maldekstra flanko kuŝis en ombro. Li trapaŝis la straton, staris iom da tempo ĉe la kontraŭa angulo, ekrigardis posten kaj malrapide ekiris returnen, ofte rigardante malantaŭ si, kvazaŭ la loko lin allogus, kvazaŭ pezaj peziloj ŝargus liajn piedojn. (Daŭrigota.)

## Anoncetoj.

(Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj kostas por dufoja enpresio la samon kiel kvin numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresio kostas la duoblon.)

**DESEGNANTOJ ATENTU!** Ni intencas eldoni malkarajn kolorajn poŝkartojn esperantaj. Desegnaĵoj kaj idoej serĉataj. Oni skribu al Fratoj Feihke, Bydgoszcz (Polio), Petersona 11.

**MIGRADO TRA TATRA.** Mi serĉas kamaradon (kongresano de la XIII-a), kiu post la kongreso partoprenos en dektaga piedmigrado tra la Alta Tatras. Bonvolu skribi al s-o H. Kappelmann, Dresden, Queckbrunnen 4, III.

**ANEKDOTARO.** Ĝus aperinta: Anekdotaro, kolekto de ĉ. 300 anekdotoj, en Esp. tradukitaj el la germana kaj ĉeĥa lingvoj de prof. J. Šišser, direktoro de la urba esp. lernejo Saaz (Ĉeĥoslovakio). Bonega legaĵo por komencantoj kaj progresintoj. Eldonisto: J. Kern, Saaz (Ĉeĥoslovakio). Prezo kr. ĉ. 5.— (mk. 5.—).

**POŝTOFICISTOJ.** 100 lernantaj gepoŝtoficistoj bavariaj deziras korespondi esperante kun ĝekolegaj eksterlandaj. Oni petas, sendi adresojn al J. Jacob, supera poŝtadministristo, München 5, paketpoŝtoficitejo (Paketpostamt), Bavario.

**RAKONTETOJ.** A. Mexin, 65, Grand'Rue, Montreux (Svis.) petas sendi al si ĉiulandajn rakontojn aŭ legendojn. (Jam posedas rusajn, germanajn kaj francajn.) Respondoj per ĉiuj svizaj vidoj aŭ alia afero el Svisujo.

**FERVOJISTOJ.** Adresojn de fervojistoj esp. mi senkoste volas anonci en „Reichseisenbahnzeitung“, se mi ricevos tiajn deziron. Por traduki la „Internacia Konvencio pri la Transporta Trafiko“ mi ankaŭ bezonas la helpon de ĉiulandaj esperantistoj por krei fakvortaron fervojajn. Ernst Muthschall, Forst i. L., Germ., Gubenerstr. 28.

**ESPERANTISTOJ EN PARIZO.** Hispana samideano bezonas malgrandan, ne meblitan loĝejon en Parizo aŭ ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Ankaŭ li serĉas laboron kiel lignajisto. La pasintan jaron li loĝis en Parizo kaj parolas francan lingvon. Se iu afabia kamarado povas ĝin oferti al li, scilgaj ĝin al jenaj adresoj: Marguerite Petit, 26 Boulevard de la Chapelle, 10 arrd., Paris, aŭ s-o Johano Compte, strato Lazareto 52, Barcelona, Hispanio.

**PETO.** 2 junaj antverpenaj instruistoj deziras migri per biciklo tra Germanio al Ĉeĥoslovakio dum sia granda libere tempo (aŭgusto-septembro). Volontege ili loĝus unu nokton ĉe diferencaj samideanoj dum la migrado. Kiuj bonvolus akcepti ilin, estas afable petataj skribi al s-o Fr. Lotry, Wilrycksche vest 76, Antverpeno, Belgio.

**STUDENTINO** de Universitato, kiu intencas partopreni la Kongreson en Praha, deziras dum la kongreso malmultekostan loĝejon ĉe esp. familio aŭ ĉe koleginio. Ofertojn peras la redakcio de ET.

**EDZIĜO.** Laboristo, ĉ. 35-jara, deziras konatiĝi kun samaĝa esperantistino de kiu ajn nacieco por eventuala edziĝo. Alskriboj kun fotografoj estu adresataj al s-o D. Holm, Källgatan 4, Eskilstuna, Svedio.

**EDZIĜOPETO.** Tridekjaraulo deziras edziĝi al fraŭlino aŭ vidvino, kiu laboras por la esp. lingvo; ŝi devas esti preskaŭ samaĝa. Sendu portreton, poste mi sendos la mian. Mi estas laboristo. S-o Mariano Doñto, str. Prado 110, Habana, Kuba.

**ESP. LERNEJA LIBRO POR FACILA LEGADO.** Baldaŭ aperos „Lnuaj Paŝoj“, lerneja libro por facila legado: rakontoj el ĉiuj landoj, proverboj kaj sentencoj. Sim. adesi al Alexandra Mexin, 65, Grand'Rue, Montreux, Svisujo.

### Korespondo kaj Interŝango.

(Dufoja enpresio kostas la samon kiel tri numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresio kostas la duoblon.)

S-o Sava Stojanov deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj leroj kun ĉiulandaj samideanoj. Adreso: str. Opalčenska 6, Sofia, Bulg.

S-o Cugliolo Jean, 5 avenue de la Liberté, Courbevoie (Seine, Francujo), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Sétot, 16 rue Guillaume Bertrand, Paris 11, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn ilustr. kaj poŝtmarkojn kun ĉiulandaj samideanoj.

S-o Artur Tamar, Bydgoszcz (Pol.), Blonie 5, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn ilustr., poŝtmarkojn, gazetojn en esp. kaj naciaj lingvoj kun la tuta mondo. Al ĉiuj respondoj, S-o Jozef Wawrzynski, Bydgoszcz, ul. Rycerska 5, Polio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leroj kun ĉiuj landoj (precipe kun fraŭlinoj). Interŝanĝas ankaŭ papieronon kaj poŝtmarkojn.

S-o Izaak Spiro, lernanto, Zoppot bei Danzig, Kronprinzenstr. 4, Pershinke, deziras korespondadi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, papieronojn kaj mobiletojn.

Ĉiuj gesamideanoj, kiuj sendas ĉ. egalval. nedif. stampitajn poŝtmarkojn negermanajn, tuj ricevos 10 aŭ 20 poŝtkartojn ilustritajn de la belega Rejnlando. Paul Becher, Köln a. Rh., Burgunderstr. 7. — Ankaŭ korespondas per poŝtkartoj, leroj (bfl.) kun ĉiuj landoj.

S-o Hermann Petermann, Hagen i. W., Fleyerstr. 57, Germ., deziras interŝanĝi artajn poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Certe kaj tuj respondoj. Kiu sendas al mi 50-50 nesamajn poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same tiom da germanaj poŝtmarkoj. Hermann Wolfertz, instruisto, Menzelen-West, Rejnlando, Germ.

Fritz Thiel, Swinemünde (Germ.), Seestr. 2, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Werner Meschke, Plauen i. V., Germ., Gariensstrasse 47, deziras korespondi kun eksterlanduloj per poŝtkartoj ilustritaj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj gazetojn esp. Tuj kaj nepre respondoj al ĉiuj.

S-o Franz Strätz, Halle a. S., Germ., Lessingstrasse 28, II., deziras korespondi kun eksterlanduloj per poŝtkartoj ilustritaj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj esp. gazetojn. Tuj kaj nepre respondoj al ĉiuj.

S-o Paul Becher, poŝtoficisto, Köln, Germ., Burgunderstr. 7, deziras korespondi per leroj kaj poŝtkartoj kun gesamideanoj en ĉiuj landoj.

S-o E. Friebe, instruisto, del. de UEA, Dresden-Dobritz, Residenzstr. 24, I., serĉas ĝekorespondemulojn en la tuta mondo. (Leroj pri ĉiuj temo, li poŝtkartoj de vidindaĵoj, de la popola vivo.) Donas informojn pri komerco kaj industrio en sia regiono. Preferas neinterromptajn korespondadon.

Fraŭlo Jozefo Benagez, Esp. Grupo, Centro de Dependientes, str. Prado 61, Habana, Kuba insulo, deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leroj pri ĉiuj afero. Mi ĉiam kaj tuj respondoj.

## Kataluna Esperantisto

Oficiala Organo de Kataluna Esperantista Federacio.

Ĉiunonata gazeto, nur esperante redaktita, sur kiu regule aperas bonegaj tradukoj de valoraj verkoj el la kataluna literaturo.

Jarabono: 5 pesetoj.

Redakcio kaj Administracio: Carme, 30, Barcelona.

## 5a Internacia Foiro de Frankfurt m.



25. septembro ĝis 1. oktobro 1921.



Importo. 30 branĉoj. Eksporto.

Presajoj en germana, angla, dana, franca, hispana, itala, nederlanda, norvega, sveda kaj esperanta lingvoj.

„Antaŭ-Katalogo“ kun plurlingva kaj esperanta registro, „Listo de Komercaĵoj“ en Esperanto.

Detalajn informojn petu tuj de

Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt m. Germ.

## Spertaj Esperantistoj el ĉiuj landoj

serĉataj kiel pagotaj helpantoj por la eksterlanda organizo de eldonejo de eksport-adreslibroj.



Estas en preparo:

### Eksport-Adreslibroj

de la germana elektro-industrio  
2 volumoj, 5-lingvaj,  
de la germana industrio de metal-artikloj  
4-lingve,

de la germana industrio de delikafmetaloj (bijuterio, or- kaj arĝentajoj) 4-lingve,  
de la germana industrio de ludiloj, 4-lingve,  
de la tuta industrio de maŝinoj kaj instrumentoj, 6-lingve.

Jam mendeblas estas:  
Eksport-adreslibro de la led-industrio de Offenbach, 4-lingve.

Seriozajn ofertojn kun detaloj (Esperanto korespondadita) sendu al:

Auslands-Werbe-Dienst  
Kaiser Wilhelm Passage 18,  
Frankfurt a. Main (Germ.).

## Plej malkaraj esperantaj libroj:

Kabe, Internacia Krestomatilo	germ. mk.	6.—
Belmont, Sonoj esperantaj	"	5.—
Slenkiewicz, Kio okazis foje en Sidono	"	2.—
" Ni sekvu Lin	"	3.—
Reymont, En fumejo de l' opio	"	3.—
Fredro, Consilium facultatis	"	4.—
Div. aŭtoroj, Kelkaj noveloj	"	5.—
Grabowski, El Parnaso de Popoloj	"	10.—
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1908	"	10.—
Bela Manto, La dorna karesilo	"	4.—

Riceveblaj ĉe

Ksaw. Alfus, Tarnow (Pol.),  
Wied. Bank Zwiak,  
kontraŭ sendo de mono en rekom. lero.


**Kongresanoj por Praha!**  
Estas urĝa tempo  
por havigi al vi pasporton  
kaj vizon de ĉsl. konsulo!

## ARGENTINIO.

bonege dum 7 jaroj kun la tieaj ekonomiaj cirkonstancoj. Post kelkmonata restado ĉi tie reveturos Argentinon, trapasante okcident-kaj nordokcident-eŭropajn landojn. Absolutaj morajaj-materiaj garantioj. Adreso ĝis la XIII-a: L. Kelety, Szászsebes (Sebesul Sasces), Transilvanio, Rumanio; poste: Kelety-Martelli, c. Caseros 528, Buenos-Aires, Argentino.

## II-a Internacia Foiro de Reichenberg

Ĉeĥoslovakio.



13.-21. de aŭg. 1921.

Unua kaj plej granda kvalita merkato de la tuta grandindustrio de Ĉeĥoslovakio. Proksimume 3000 ekspozantoj de la en- kaj eksterlando. Plej bona kaj plej malmultekosta okazo por aĉetoj en 20 diversaj branĉoj. Pasportaj faciligaj, fervojaj rabatoj, apartaj vagonaroj. Komerca debito de la I-a Foiro 3/4, miliardoj kromoj ĉsl. Vizito de la Foiro estas bone kunigebila kun la vizito de la XIII-a Universala Esperanto Kongreso en Prago, kun la vizito de la famekonataj nord-bohemaj banurboj kaj de la foiro de Leipzig.

Informoj:

Messeamt Reichenberg  
Ĉeĥoslovakio.

Venu al Reichenberg kaj vidu la praktikan uzon de Esperanto ĉe la foiro.

## Brno (Brünn),

ĉefurbo de Moravio (Ĉeĥoslovakio), 220 000 loĝantoj, sidejo de bohemiaj (ĉeĥaj) universitato, teknika lernejo, alta agrikultura, veterinaro kaj arbarista lernejo, de germana teknika lernejo, centro de fervojaj linioj de Meza Eŭropo kondukantaj de Belgrad, Budapeŝto, Vieno, Warszawa, Praha, pro sia industrio nomata „ĉeĥa Manchester“ bonvenas ĉiutage fremdajn gastojn, kiuj alvenas por vidi Napoleonan batalejon ĉe Slavkov (Austerlitz) kaj nove trovitajn grotojn stalagmo-stalakitajn en subtera labirinto de Macocha, abismo 158 m profunda, plej granda kaj mirinda pejzaĝo en Meza Eŭropo.

## Kontorartikloj

ĉiuspecaj

paperaĵoj, stampiloj, stampil-kusenoj, email-ependajfoj (ŝildoj) ĉiaspecaj.

Liverado de libroj germanaj kaj esperantaj.

Reala servado. ★ Malkaraj prezoj.

Seriozaj reprezentantoj serĉataj.

Specimenoj sendotaj kontraŭ resp.-kup., plipagon mi repagos.

**Rob. Pfennigwerth, Hirschfelde**  
(Saksujo).

Poŝtekkonto Dresden n-o 4761. — Bankkonto Loebauerbank Hirschfelde (Saks.).